nia voĉo

madrida esperanto-liceo januaro 2018

## CELEBRADO DE LA ZAMENHOF-TAGO

Madrida Esperanto-Liceo celebris la Internacian Tagon de Esperanto (Zamenhof-Tagon) la sabaton 16an de decembro, en la kultura centro Mariano Muñoz (Asociación Vecinal La Cornisa), en la kvartalo Pradolongo-Usera, kie ni luis spacon tiucele.

La mateno estis dediĉita ĉefe al la prezentado de libroj, memorante la originon de la celebrado kiel Tago de la Esperanto-Libro. Unue, Miguel Fernández prezentis la kvar librojn, kiujn oni publikigis al li ĉi-jare: “Vamos, vemos / Ni iras, vidas”, “Tagoj kaj ruinoj”, “La defio vivi kaj krei” kaj la dua eldono de “Miguel Hernández, poeto de l’ popolo”. Poste, Jorge Camacho prezentis la plenan poemaron de Zamenhof, ĵus eldonitan, kaj sian propran poemaron “Brulvunde”. Fine, José María Salguero (*Kani*), kiu vojaĝis el Don-Benito, prezentis la ĵus aperintan libron, eldonitan de Sennacieca Asocio Tutmonda, “Antaŭ unu jarcento”, kiu entenas tekstojn rilatajn al la Unua Mondmilito kaj Esperanto.



Poste homoj kune tagmanĝis en la ejo mem, kaj la vespero estis dediĉita al ludoj kaj aliaj senĝenaj aktivadoj.

Entute partoprenis iom pli ol 20 esperantistoj.

## PREZENTADO DE “TAGOJ KAJ RUINOJ”

Ankaŭ okaze de la Tago de la Libro en Esperanto, la 18-an de decembro estis prezentita en neesperantista medio la verko "Tagoj kaj ruinoj", de Jaume Grau Casas, en traduko de Miguel Fernández.



La aranĝo en Madrid, organizita de SATeH kaj de Liceo de Esperanto de Madrid, havis lokon en la kultura centro Marx Madera, en la madrida laborista kvartalo Orcasitas. Ĉeestis esperantistoj, ĉiamuloj ĉe la centro kaj eĉ najbaroj de aliaj kvartaloj de la distrikto Usera. La prezenton enkondukis la madrida esperantisto kaj soci-kultura aktivulino Mati Montero kaj disvolvis la tradukinto de la verko. En la lasta parto, li proponis komunan voĉlegon de originalaj hispanlingvaj fragmentoj de la libro, kio estis tre ŝatata.

## NOVA LITERATURA VESPERO

Daŭrigante la komencitan tradicion, en januaro ni dediĉos alian lundon al la literaturo. En tiu ĉi kazo la homo omaĝota estos la eldonisto Juan Régulo Pérez, forpasinta la 27an de januaro 1993, do okaze de la 25-jara ĉimonata datreveno de lia morto. Ni proponas memoradon pri li la 15an de januaro, je la 7-a vespere, en nia sidejo, per kolokvo kunordigota de la prezidanto de HEF kun partopreno de Miguel Fernández.

La literatura vespero de la 23a de oktobro, omaĝe al la elstara poetino Marjorie Boulton, gvidita de Jorge Camacho, estis filmita, kaj la tuto estas jam spektebla en la kanalo de HEF en la adreso https://www.youtube.com/watch?v=0ohRXgXkLUw.

**nia voĉo** **januaro 2018**

## KONGRESOJ EN MADRIDO

Estis jam publikigita la "Unua Anonco", kun ĉefaj detaloj pri la kongresoj kiuj okazos en Madrido en julio 2018: la 77a Hispana Kongreso de Esperanto (20-22 de julio) kaj la 51a kongreso de ILEI, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (21-28 de julio).

Oni ĝin povas legi en la reto, en la adreso http://www.esperanto.es/hef/images/kongreso/madrid/unua-komuniko-madridaj-kongresoj.pdf

La reta aliĝilo troviĝas en la adreso https://goo.gl/forms/MPS0RB2UM0H6eQYG2 (aŭ serĉu ambaŭ ligilojn per la ĝenerala adreso http://esperanto.es/kongreso)

## NOVA KURSO

Nova kurso de esperanto komenciĝos en nia sidejo la duan lundon de januaro, t.e. la 8-an, se almenaŭ tri homoj enskribiĝus. Ĝin gvidos Andy Hernández. La lecionoj daŭros unu horon kaj duono, de la 16:30 ĝis la 18:00 vespere, ĉiujn lundojn dum tri monatoj, kaj oni uzos la libron "¿Sabe Usted Esperanto?".

Por aliĝo kaj/aŭ demandoj, simple oni kontaktu rekte kun Andy ĉe andyflorida@hotmail.es.

## VIZITIS NIN

Pluraj ekstermadridaj samideanoj vizitis Madridon dum la monato decembro, sed bedaŭrinde, pro la diversaj festoj, kelkaj el ili, malgraŭ sinanonco, nur povis mesaĝi, sed ne kunveni: Adam el Belgio, Michel el Francio, Cornélio el Orienta Timoro, Otto el Norvegio. Espereble ni havos okazon renkontiĝi kun pli da tempo.

## ANONCO DE KUNVENO DE MADRIDA E-LICEO

La 29-an de januaro okazos Ĝenerala Kunveno de Madrida Esperanto-Liceo. Se vi estas membro de la asocio, vi baldaŭ ricevos la formalan kunvokon, kun la tagordo.

Se vi ankoraŭ ne estas membro, memoru ke vi estas tre bonvena aliĝi. La kotizo estas nur 12 eŭroj jare. La aliĝilon vi trovos en la fako "dokumentoj" de la retejo de MEL http://esperanto.es/mel/, kaj vi povas profiti ankaŭ iun ajn viziton al la klubejo.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30.

Pro la festo, la unuasabataj renkontiĝoj ĉimonate okazos la duan sabaton, do la 13-an de januaro. Ni ankaŭ ŝanĝas lokon (sed tre mallongdistance) al tre apuda drinkejo Minibar, malgranda, sed sufiĉe agrabla, kiu havas en supra etaĝo malgrandan saloneton kie ni povos babili komforte. Ĝi situas en strato Mesón de Paños, 1 (vidalvide la antaŭan lokon), proksime al metrohaltejo Opera. Ni rendevuos ekde la 18:00 horo.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com